

KATALUNA ESPERANTISTO*

*Llengua internacional i drets lingüístics

NUMERO 349 (115)
KVINA EPOKO
JANUARO-MARTO 2009

› Ideologia i
desenvolupament
en les llengües
planificades

- › Nova bildo de KEA
 - › Asembleo
 - › Kataluna Socia
Forumo
 - › Sukcesa
Iberia Renkontiĝo
 - › Tradukiloj progresas
 - › Literaturaj premioj
en Perpinjano
 - › Dekunu-taga
maratono
 - › Montagut pri Verne
-

ESPERANTO*
CAT

*Asociació Catalana d'Esperantc
Kataluna Esperanto-Asocio

Quanta gent parla anglès a Catalunya?

La societat que ens envolta ens fa consumir més i més enquestes d'opinió. Un problema de les enquestes, i és ben sabut, és com es formula exactament la pregunta, a qui es fa, qui la fa, en quin moment, etc. En els temes lingüístics, a més, cal afegir la poquíssima concreció d'allò que es demana: per exemple, si es "parla" una determinada llengua. Parlar una llengua pot voler dir tan sols "defensar-s'hi", és a dir poder contestar breument i no necessàriament de forma gaire correcta a una pregunta de tema general, o ser capaç de demanar un cafè. L'espectre de "parlar una segona llengua" és tan ampli que pot abastar situacions enormement diferents. I, justament, el resultat de tot plegat són estadístiques amb diferències desconcertants.

Pàgines 12 i 13



MARK ALLERTON



Renovado kaj tradicio

Vi tenas enmane novan numeron de *Kataluna Esperantisto*. Vin eble surprizos la estetika renovigo, fruktinta el detala retrorigardo al ĉiuj pasintaj eldonaĵoj, longa diskutprocezo pri la celoj de la asocio kaj enprofundiĝo pri la plej oportunaj formoj komuniki ĝiajn ŝlosilajn valorojn.

Tamen ne eblas, nek indas ĉion komenci de nulo. *Kataluna Esperantisto* estas portanto de 99-jara tradicio de la kataluna esperanto-movado. Ĝia nomo estas konsiderata gravega atuto fare de ne malmultaj asocioj. Interesa kaj iom pasia diskuto leviĝis, kiam oni proponis antaŭ kelkaj monatoj forlasi la nomon kaj elekti novan, en la kataluna, por bildigi la malfermiĝon de la revuo kaj la asocio al la neesperantlingva publiko interesiĝanta pri lingvaj rajtoj kaj lingva diverseco.

Ĉi-okaze la laboro estis multe pli solida ol antaŭ dudeko da jaroj, kiam oni ne kuraĝis pli ol ŝanĝi kelkajn detalojn de la modernisma gazetkapo. Starigita konkurso por anstataŭi ĝin fiaskis kelkajn jarojn poste, malgraŭ ricevo de interesaj proponoj, pro malmatureco de la propono. Necesis atendi ĝis 2003, kiam ĝi estis ŝanĝita, tamen nur per duobligo: nova litertipo staris sur fono kun la malnova kapo. Ĉi-foje la titolo konserviĝas, sed oni aldonas kromtitolon, kio ja ne estas novaĵo. Kaj plej grave: oni enpaŝas post longa grupa diskutado, konsiinte pri la signifo de ago.

Hektor Alos i Font

En ĉi tiu numero kunlaboris: Anna Raventós, Bartomeu Costa, Carles Vela, Christian Pinard, Darío Rodríguez, Ferriol Macip, Guillem Sevilla, Josep Enric Peres i Blesa, Llibert Puig, Lluís Batlle, Mon Cardona, Ramon Llop, Ramon Perera, Raúl Martínez, Sílvia Mampel.

Kataluna Esperanto-Asocio:

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Faksno: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2008: individua abonanta membro, 64 eŭroj; pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 128 eŭroj; individua dumviva membro, 1280 eŭroj; kolektiva membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers, Agència 001, Barcelona
kontonumero: 3025 0001 15 1433398158
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158
Konto UEA: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Llibert Puig i Gandia, vicprezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Ferriol Macip i Bonet; kasisto: Àngels del Pozo Serrano; komitatoj: Gemma Armadans, Gerard Escuer, Ramon Perera, Víctor Solé.
Kontrola Komisiono: Núria Coll, Christian Pinard, Òscar Puig.

Kataluna Esperantisto:

Provizora ĉefredaktoro: Hèctor Alòs i Font; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: joves@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/joves
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Banko: Caixa d'Enginyers, Agència 002, Barcelona
kontonumero: 3025 0002 47 1433276794
IBAN: ES89 3025 0002 4714 3327 6794

Estraro: Aida Sunyol, Anna Raventós, Roger Sanjaume.

Impres a/Presita ĉe: Copisteria Garriga, Ronda Zamenhof, 98, Sabadell, (Vallès Occidental), tel. 93 727 25 55. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Nova bildo de KEA

La esperantistoj ĝenerale ne sufiĉe konscias pri grava atingo de nia tutmonda movado: skemeca ĝermo semita antaŭ cent dudek jaroj fruktis en plenkreskan vivantan lingvon kun kulturo, kun tradicio, kun literaturo ktp, konita ne de ĉiuj, sed konita kaj parolata tra la tuta mondo. La ilo jam ekzistas kaj estas bona, ni ne plu devas revii pri ĝi. Nun estas la momento okupiĝi pri aliaj ĉagrenoj de la homaro, kompreneble laŭ nia kapablo kaj utiligante esperanton. Tiel esperanto komencos esti utila preter ĝia ekzisto mem kaj samtempe aliaj homoj lernos pri ĝi kaj pri ĝia utilo.

Simile ni, katalunaj esperantistoj, ne sufiĉe konscias pri grava atingo de nia kataluna movado nuntempa. Ni sukcesis revivigi asocion malaperigitan kaj persekutatan de la frankisma diktaturo. Ni sukcesis repreni kaj la spiriton kaj la tradicion de niaj antaŭuloj kaj ĝisdatigi ilin. Nia grupo ĝuas sanon kompareblan al tiuj de la plej bone funkciantaj esperantaj societoj tra la mondo, kaj nia agado ĝuas prestiĝon.


Ni devas senti nin liberaj rilate nian moralan devon superi la damaĝon kaŭzitan de la diktaturo, ĉar ni jam sukcesis, kaj de nun ni havas la eblecon vicigi nin inter la plej progresemaj esperantaj grupoj pere de novaj projektoj.

Novan projekton ni jam havas, ĝia bazo estas la dokumento “Celoj, Valoroj kaj Principoj de KEA” aprobita de nia asembleo dum la pasinta jaro 2008. La kerno de nia laboro konsistas en la diskonigo de niaj analizoj kaj proponoj rilate lingvan diversecon, lingvajn rajtojn ktp, diskonigo celanta ĉefe la klerajn tavolojn de la socio. Por tia diskonigo ni posedas diversajn komunikilojn: nian gazeton, nian retpaĝon, niajn librojn kaj broŝurojn, niajn flugfoliojn k.a. Ni volas, ke niaj informiloj estu plej modernaj laŭ stilo, estetiko, kapablo kapti la atenton, kapablo eviti antaŭjuĝojn, ktp. Samtempe ni plene konscias pri la forto kaj potenco, kiujn donas al ni nia historio kaj tradicio, kaj ni volas ĉion harmoniigi.

Ni ne improvizas, kaj jam de antaŭ multaj monatoj skipo da homoj kun alta nivelo rilate modernajn dezajnojn, modernajn bildojn de entreprenoj ktp laboras super tiu projekto, kaj pretigis tre modernan, profesionan kaj alogan dezajnon por nia gazeto kaj post intensa partopreno de plilarĝigita skipo oni interkonsentis titolon por ĝi – titolon, kiu sekurigas la kontinuecon de nia historia prestiĝo kaj malfermas novan vojon por la novaj projektoj. La samaj homoj daŭre laboras por funde ĝisdatigi nian retpaĝon kaj harmoniigi ĝin kun la gazeto.

Ni ne improvizas, kaj jam de antaŭ multaj monatoj skipo da homoj kun alta nivelo laboras super tiu projekto

Entute, la laboro ne estas finita, sed komenciĝas longa procezo de adaptado al la novaj ideoj kaj rimedoj de ĉiuj informiloj de KEA kaj KEJ kaj eventuale de la lokaj grupoj



GUILLEM SEVILLA

Tia laboro kaj ĝia rezulto meritas kaj bezonas esti prezentata al niaj samasocianoj, komprenata kaj akceptata de ni ĉiuj, por ke ni kune decide paŝu laŭ la moderna plilongigo de nia vojo.

La procezo

La procezo, kiu portis nin al la nova bildo de la revuo, estas longa kaj kompleksa. Ĝin bone klarigis Guillem Sevilla kaj Rut Rovira en prezenta artikolo en marto de 2007 en ĉi tiu revuo kaj iom poste en intervjuo publikigita de KIS-TV. Okaze de peto renovigi la TTT-ejon de KEA, tiuj du dezajnistoj komprenis la mankon de t.n. “asocia bildo”, nome: ne estis klaraj la ideoj, kiujn la asocio celis transdoni, ĉar ili ŝanĝigis de informilo al informilo; kaj ne estis klaraj ankaŭ la grafikaj rimedoj uzataj por tio, ĉar ankaŭ ili estis tre diversaj. Pro tio ili entreprenis profundan analizon, kaj anoncis sep-fazan programon.

Parto de la farenda laboro estis interna diskutado de la ŝlosilaj ideoj de la asocio, pro kio estis starigita ses-kapa komisiono. Post unu jaro da laboro, unue interne de la laborgrupo kaj poste en malfermitaj diskutoj, la asembleo de KEA aprobis en marto 2008 fundamentan dokumenton, kiu klarigas la celojn, valorojn kaj principojn de la asocio.

Paralele al tiu laboro Guillem Sevilla kaj Rut Rovira daŭrigis sian analizon, kiel oni povis legi ekz. en la revuo de junio 2007, kiam oni raportas pri 19-demanda enketo al 14 membroj de KEA por eltiri ŝlosilajn sintenojn pri la asocio.

La diagnozo

Plia ŝtupo venis fine de la kvara program-fazo, jam en printempo 2008, kiam nova detala 27-paĝa interna dokumento titolita “Diagnòstic. Desajustaments detectats en l’estratègia actual de comunicació”. La dokumento analizas la nunan esperanto-publikon, surbaze de la socilingvistika esploro pri la katalunaj esperantistoj aperinta fine de 2007; kaj samtempe proponas ampleksigon de la celpubliko per malfermiĝo al homoj ne tiel maldekstraj kaj katalunismaj.

La dokumento atente analizas diversajn informilojn eldonitajn de la asocio aŭ eĉ informojn afiŝitajn de unuopaj esperantistoj en retgazetoj. La rezulto ŝokas pro la diverseco de la uzataj prezento-rimedoj: “mankas tipografia unueco, aŭ identiga koloro, aŭ sama bildostilo kaj eĉ la logotipo ŝanĝiĝadas”. Sekve, ekstaras la demandoj: “Kia estas tiu asocio? Ĉu ĝi ŝajnas forta, bone kunordigita kaj kredinda, aŭ ĝi ŝajnas malforta, nekunordigita kaj do malmulte kredinda?” Sed simila problemo staras, kiam oni analizas la enhavojn de la informiloj: jen oni uzas retorikon de manifestacioj kaj pamfletaj frazoj, jen oni provas ellabori pli ĝeneralan diskurson kun tute alispeca bildo. “[Tiu] situacio fariĝas konfuziga kaj senefika pro la reciproka mallegitimigo de la diversaj pravigoj.” Laŭ la aŭtoroj “necesas konsideri centriĝon sur la ecoj de esperanto mem, sur la defendo de la lingvaj rajtoj kaj laŭeble klopodi senpolitikigi la lingvon”.

La dokumento diskutas aspektojn kiel la nomon de la asocioj, t.e. inkluzive de Kataluna Esperanto-Junularo kaj Valencia Esperanto-Junularo: se la asocio celas agadi en la tuta lingva areo, sed la termino “kataluna” estas rigardata en larĝa medioj ekster Katalunio kiel apartenanta nur al la Kataluna Aŭtonoma Komunumo, ĉu eble estus pli oportune eviti ĝin? Tiel faras pli kaj pli da asocioj kaj eĉ politikaj partioj, oni argumentas. Aliflanke, ĝi substrekas la neceson vendi “esperanton” kiel tuton, t.e. unuecigi la prezentoformon ne nur de KEA kaj de ties junularaj ekssekcioj, sed ankaŭ de la lokaj grupoj, tiel ke iliaj eldonaĵoj uzu kongruan bildon, kaj tiel la komuna mesaĝo plireliefiĝu kaj plifortiĝu. La analizo eĉ proponas trarigardon de la asocia distribuo de taskoj, por igi informadon pli efika.

La rezultoj

La konkludoj de tiu analizo estis diskutitaj kaj aprobitaj de la laborgrupo, tiel ke la analizo sekvis pluen al difino de detala difino de grafika rimedaro por KEA kaj eventuale por la aliaj katalunaj esperanto-societoj, kiuj pretas akcepti ĝin. Unua provo de logotipo aperis en septembro, kaj ĝi estis testita inter neesperantistoj por vidi, kiaj estas la ideoj venantaj al ili, kiam ili renkontas

por la unua fojo la logotipon, ne sciante, ke temas pri esperanto. Tio montris, ke taŭgas ioma modifo: ĝi estis farita en oktobro, kaj kun ĝi plena rimedaro estis liverita (litertipoj, prezentoformoj ktp.). Estis decidite ekuzi ĝin nur de la sekva jaro 2009, tamen ĉar en novembro oni planis la lanĉon de la nova kolekto Delfi Dalmau, oni konsideris oportune ekuzi ĝin tie, kaj tiamaniere ektesti ĝin en realo. La proponoj estis ankaŭ ne nur diskutitaj en la laborgrupo kaj la estraro, sed akau la retlisto estis konsultita, kaj ekestis interesa kaj klariga debato.

Samtempe oni diskutis pri la plej taŭga formo de la asocia organo, *Kataluna Esperantisto*. Pro manko de mono kaj troa pligrandigo de la laboro, oni principe flankenlasis la ideon dividi ĝin en du malsamajn revuojn –bultenon por la membraro en esperanto kaj katalunlingvan revuon por la ĝenerala publiko. Krome oni ŝatas ankaŭ la elastecon donatan de unusola revuo, en kiu unu parto aŭ alia povas ampleksiĝi laŭnecese pro aparte interesa materialo. La ĉefaj diskutoj staris, do, en la nomo de la revuo: ĉu ŝanĝi ĝin por evidentigi, ke la ĉefa celpubliko estas la neesperantlingva publiko, aŭ ĉu konservi ĝin por esti lojalaj al tradicio, tamen aldonante al ĝi subtitolon en la kataluna por substreki ĝian malfermitan karakteron. Kaj en ambaŭ okazoj: kiu devas esti la elektita nomo aŭ subtitolo?

Post iom ŝtormaj diskutoj en la retlisto, la debato estis portita al la asembleo, kaj ĉi tiu elektis la aldonon de subtitolo, kaj transdonis la elekton al la estraro. Fine, post denova debato interne de la laborgrupo, kiu elektis la kromtitolon “Llingua internacional i drets lingüístics”, surbaze de la asociaj valoroj.

Entute, la laboro ne estas finita, sed komenciĝas longa procezo de adaptado al la novaj ideoj kaj rimedoj de ĉiuj informiloj de KEA kaj KEJ kaj eventuale de la lokaj esperanto-grupoj. Krome, detalan klarigon kaj pravigon de tiuj principoj necesas transdoni ankaŭ al la unuopaj esperantistoj, por ke ilia memstara varb-agado (ekz. en retgazetoj) laŭeble ne malkongruu kun la longe diskutitaj kaj interkonsentitaj principoj. □

Asembleo

La jara asembleo de KEA okazis la 14an de marto kun la partopreno de 18 membroj: simila kvanto al la antaŭaj jaroj, kvankam ĉi-foje ĝi okazis en la asocia sidejo, en Sabadell, anstataŭ en Barcelono. Tri aspektoj igis la ĉi-jaran asembleon aparte grava: la buĝeto, la nova asocia bildo kaj ŝanĝo en la estrar-postenoj.

Post ses jaroj da tre malavara monhelpo, Manel Vinyals ne plu financados la asocion ekde la kuranta jaro. Tiel estis antaŭvidite kaj interkonsentite, ĉar la celo estis starigi firman bazon, per kiu KEA povis plibonigi, plireguligi kaj plioftigi sian agadon: aranĝojn, eldonaĵojn, informadon ktp. Estas tempo vidi, ĉu efektive KEA povas teni la nivelon de sia aktivado, kaj plibonigi ĝin, surbaze de siaj akirita sperto kaj propraj financaj kapabloj. Do la ĉi-jara buĝeto montriĝis turnopunkto. Danke al la tre bonaj ekonomiaj rezultoj de la pasinta jaro kaj al atenta ŝparado en la kuranta jaro, la asembleo decidis akcepti la estraran proponon altigi la bazan membrakotizon de 60 al 64 €, kaj samtempe konservi senŝanĝa la salajron de la dungito.

La projekto de nova grafika bildo de la asocio estis prezentita al la partoprenintoj, kaj unuvoĉe aprobita. La asembleo aprobis la estraran proponon aldoni subtitolon en la kataluna al la nomo de la asocia organo, kio ankaŭ estis senopone akceptita, kaj mandatis la estraron pri la disvolvo de la ceteraj aspektoj.

En la ĉapitro pri ŝanĝo de estrar-postenoj, Llibert Puig, kiu pasintjare anoncis sian ĉi-jaran demision el la prezidanteco pro aĝo kaj malsano, akceptis daŭrigi pro tio, ke lia sano pliboniĝis kaj la posteno montriĝis ne tro postulema. Aliflanke, Ferriol Macip preferis daŭrigi kiel asocia dungito –elekto plene subtenita de la estraro–, sekve petis liberigon de la sekretaria posteno. Tiucele, Gemma Armadans kaj Ramon Perera pretis transpreni parton de la laboro, tiel ke ĝi dividiĝos inter la tri. Siavice, Víctor Solé estis elektita nova membro de la estraro.

Asembleo de CES

Vendredon la 22an de februaro 2008 okazis la jara asembleo de Centro de Esperanto Sabadell (CES) kun tre malmultaj partoprenantoj.



La jara asembleo de KEA okazis la 14an de marto

La agado de la asocio estis dum 2008 tre riĉa kaj elstaras la omaĝo al la loka pioniro Jaume Viladoms kaj la 34a Kataluna Kongreso de Esperanto. CES partoprenis ankaŭ en la Foiro de la Diverseco kaj dum la Librotago per budo prezentante librojn kaj informilojn.

Okazis ankaŭ estrarŝanĝo, dum kiu Marina Ollé fariĝis kasistino kaj Llibert Puig, voĉdonanto. La nova referita kaj pli juna estraro konsistas el: Éric Collignon, prezidanto; Ramon Llop, vicprezidanto; Núria Coll, sekretariino; Marina Ollé, kasistino; Xavier Murcia, Pere Bernús kaj Llibert Puig, voĉdonantoj.

lp

Lingvo-tago

Ĉiujare en Manlleu estas aranĝata lingvo-tago fare de la lernejo Miquel Martí i Pol. La pasintan fojon ĝi okazis la 12an de decembro. Post la antaŭnelonga pavimo de la strato Bellfort kaj la instalado de strat-lanternoj, al la organizantoj de la lingvo-tago venis la ideo pendigi je ili du metrojn longajn afiŝojn. La unua afiŝo montras la portreton de Miquel Martí i Pol, la dua biografias la poeton, kaj sekvas kvin afiŝoj reproduktantaj lian poemon “Vortoj por la paco” (Paraules per la pau) en diversaj lingvoj, ankaŭ en esperanto, laŭ traduko de Gabriel Mora i Arana prezentita en 1987 okaze de la centjariĝo de esperanto.

Tri aspektoj igis la ĉi-jaran asembleon aparte grava: la buĝeto, la nova asocia bildo kaj ŝanĝo en la estrar-postenoj

Kvin afiŝoj reproduktis la poemon de Miquel Martí i Pol “Vortoj por la paco” (Paraules per la pau) en diversaj lingvoj, ankaŭ en esperanto, laŭ traduko de Gabriel Mora i Arana



Oni antaŭvidis okazigi la feston surstrate, sed la pluvo devigis fari tion sub la volboj de la lerneja enirejo. Komenciĝis la programo per duknabina baletoj kaj sekvis la interveno de la kvin diverslingvaj legantoj, kiuj laŭte diris dekfoje la vorton “paco”, kaj ĉiu legis ĉe la mikrofono sian poemon en la elektita lingvo, inter ili Bartomeu Costa en esperanto

bc

En Escola Eina

Fama grafikisto kaj instruisto de la universitata faklernejo Escola Eina, Martí Ferré, petis prezenton pri esperanto. Konscia ke grafikismo ne nur devas utili al grandaj povaj entreprenoj, sed ankaŭ al popolaj grupoj, li proponis al siaj lernantoj grafikan laboron rilate al esperanto-movado, kaj tial, ni devis prezenti esperanton al ili, por ke ili sciu pri kio labori.

Tion faris Anna Raventós, Guillem Sevilla kaj Ferriol Macip. En la unua parto de la prezento, oni faris rapidan lecionon pri la funkciado de la lingvo, kaj lernejoj rapidege kapablis fari vortojn per kunmentado

kaj aldono de afiksoj. Oni parolis pri la historio de la movado kaj prezentis la nunan principaron de KEA. Post debateto, kie lernejoj multe partoprenis, rilate al principaro de KEA, Guillem Sevilla lecionis pri tipografioj, ĉefe pri ĉapelitaj, kaj prezentis la grafikon kaj simbologion de esperantismo laŭlonge de ĝia historio.

fm

Kataluna Socia Forumo

Arcadi Oliveres, unu el la partoprenantoj en la novembroj rondaj tabloj de KEA, lanĉis la proponon denove organizi Katalunan Socian Forumon (FSCat) en 2010, ĉar en tiu jaro ne okazos monda Socia Forumo. Anna Raventós kaj Ferriol Macip partoprenis nome de KEA kaj KEJ, en la organiza asembleo, la 25an de marto, celante ke esperantistoj ne partoprenu nur per budo en la Forumo, kiel en la pasinta okazo, sed entute en la Asembleo de Sociaj Movadoj por starigi kontaktojn kaj fariĝi pli influaj. Oni planas daŭre partopreni la sekvajn asembleojn kaj proponi la lingvan daŭripovon kiel temon pritraktotan en FSCat 2010.

fm

Encenguem la mar



Sota aquest títol s'aplega una acció social que tindrà lloc el proper 26 d'abril a Barcelona. Muma Soler i el seu equip, ja fa mesos que estan treballant en aquest projecte de grans dimensions. Es tracta ni més ni menys, que d'encendre 120.000 espelmes per configurar el que l'artista anomena una escultura social. I és ben bé així : d'una banda les espelmes situades a diferents carrers del barri de

la Ribera, faran l'efecte de l'entrada de les onades del mar a la ciutat. De l'altra, un dels reptes d'aquest projecte és trobar les 1.170 persones que de manera voluntària hauran d'encendre la quantitat d'espelmes necessàries.

Si alguna cosa té d'excepcionalitat aquest projecte, és el paper de l'individu com a part activa de l'art i, per extensió, l'art com a element de comunicació i intercanvi. Però... per què?

Què es pretén?

L'entrada del mar a la ciutat en forma d'onades, vol representar que no tot el que ve de fora és dolent. Es tracta de posar de manifest, el concepte d'obertura: El mar com a sinònim d'obertura a l'altre. Aquest simbolisme té especial rellevància en uns moments en què els fluxos migratoris se'ns fan molt evidents. I aquesta entrada del mar a la ciutat, pot comparar-se amb el procés que segueix una ciutat receptora com Barcelona.

Encenguem la Mar vol crear vincles de connexió interculturals entre els ciutadans que viuen a la ciutat i els que hi arriben. Per fer-ho, vol fer córrer l'aigua del mar pels carrers del barri, barrejant la gent, afavorint la cohesió social en un territori complex on un dels grans reptes és la relació veïnal i associativa. I finalment, traspasar les fronteres del barri i entrar ciutat endins obrint vies de connexió amb la resta de la ciutat i els seus habitants. Es tracta de fer venir la gent d'altres punts de la ciutat, al barri de la Ribera. De conèixer com és la gent que hi viu, els carrers, les cases. Una acció en definitiva, que promou l'intercanvi i el coneixement entre els habitants de les diferents zones de la ciutat. Es tracta de trencar barreres, eliminar allò que ens separa dels altres i cercar els que ens uneix. L'espelma en aquest cas, és només l'element que permet establir aquesta connexió, el repte és a les nostres mans.

Sílvia Mampel
Equip d'Encenguem la Mar
Barcelona, 8 de març de 2009

Aliĝoj

KEA aliĝis al tri malsamaj eksteraj iniciatoj. Unuflanke ĝi aliĝis, kune kune pli ol 150 ali-aj asocioj, al la iniciato de *Asociació Cultural Joan Amades* omaĝi la plej elstaran esploriston pri la kataluna folkloro –aŭtoron de pli ol cent libroj kaj broŝuroj– okaze de la 50-jariĝo de lia morto. Joan Amades, krome, estis elstara esperantisto, prezidinto de *Kataluna Esperantista Federacio*, kunlaborinto de la *Kataluna Antologio* en la ĉapitro pri popolkantoj kaj lanĉinto de diversaj esperanto-revuoj.

Aliflanke, KEA kaj KEJ aliĝis al la iniciato por instigi la aragonan parlamenton finfine aprobi la t.n. *Lingvoleĝon de Aragono*, pri kiu oni diskutas de antaŭ pli ol 15 jaroj. La iniciaton subtenas la ĉefaj organizoj por la defendo de la aragona kaj kataluna lingvoj en Aragono, kiel *Consello d'a Fabla Aragonesa*, *Federación de Ligallos de Fablans de l'Aragonés* kaj *Iniciativa Cultural de la Franja*. Ankaŭ en februaro 2006, KEA aliĝis al manifesto por la unueco de la aragona lingvo, kaj entute KEA sekvas de proksime la evoluon de la iniciatoj por la aragona lingvo.

Laste, KEA aliĝis al la iniciato de grupo de asocioj de la kvartalo *Ribera en Barcelono* sub la titolo “*Ni lumigu la maron*”. Temas pri la kreado de t.n. “*socia skulpturo*” per centmilo da kandeloj lumigitaj de kvartalanaj kaj sociaj grupoj. La agado apogas diversecon kune kune socia unueco, t.e. ĝi favoras diversecon kaj pacon, pro kio KEA aliĝis al ĝi kaj kunlaboras per traduko de la materialoj kaj diskonigo (vidu la akompanan artikolon en la kataluna).

Sukcesa Iberia Renkontiĝo

Komence de 2009 reokazis la esperanta aranĝo, kiun laŭvice organizas iberia asocio ĉiun jaron. La kernon de la organizado ĝuste konsistigis iberia paro –portugalino kaj kataluno– loĝanta en la gastiga urbo Porto. Jam laŭ la planita programo, la renkontiĝon ili preparis por esperantoparolantoj, kiuj simple volis renkonti amikojn kaj babili, sen aparta klopodo profiti la kuniĝon de esperantaj fortoj por disvastigi esperanton. La ĉefan celon la organizantoj atingis, agnoskas ĉiu partopreninto –kaj krome, ĉiu povis partopreni spektadon de du filmoj kun esperantaj subtekstoj, dubosolvadon pri la esperanta lingvo kaj diskuttrondon pri



RAÚL MARTÍNEZ

Partoprenantoj de Iberia Renkontiĝo 2009 gustumas faman vinon de Porto

deflankiĝo el la esperanta movado. La bona etoso de ĉiuj venintaj esperantistoj, la bonvenemo de la organizantoj kaj la kontentiga programo esperigis ĉiujn pri venonta sukcesa Iberia Renkontiĝo.

1b

Esperanto en Levante-TV

La televid-kanalo de la ĵurnalo *Levante* elsendis bonan tri-minutan elsendon pri esperanto en februaro. Tiucele ili kontaktis la valencian aktivulon Raúl Salinas, kaj intervjuis diversajn membrojn de la urba esperanto-grupo.

Artikoloj pri historio

La numero de decembro 2008-januario 2009 de la revuo pri libroj kaj kulturo *Lletres* publikigas tri-paĝan artikolon de la historiisto Francesc Poblet pri la *Kataluna Antologio*, eldonita en 1925 kaj reeldonita en 1931, la plej rimarkinda verko produktita de la kataluna esperantistaro. Aliflanke, la kvina numero de la trimonata revuo *Vallspir*, de vintro 2009, publikigis du-paĝan artikolon de Hèctor Alòs kaj Llibert Puig titolitan “*Els inicis ceretans del moviment esperantista català*”. La artikolo prezentas la komencon de la esperanto-movado en Katalunio kaj ties ligon kun Ceret, la ĉefurbo de la regiono Vallespir. Ĝi memorigas la kongreson okazintan en tiu urbeto okaze de la centjariĝo de la organizita esperanto-movado en Katalunio okazinta en Ceret en 2004.

KEA kaj KEJ aliĝis al la iniciato de Asociació Cultural Joan Amades kaj al la iniciato por instigi la aragonan parlamenton finfine aprobi la t.n. Lingvoleĝon de Aragono

KEA ankaŭ aliĝis al la iniciato de grupo de asocioj de la kvartalo Ribera en Barcelono sub la titolo “Ni lumigu la maron”

La ĉefan celon la organizantoj atingis, agnoskas ĉiu partopreninto en Iberia Renkontiĝo 2009

**Aktive laborantaj
por lingva daŭripovo**

www.esperanto.cat

ESPERANTO*
CAT
*Asociació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio

ESPERANTO*
JOVES
*Jovenut Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Junularo

**Oni anoncas
en aprilo novan
plibonigitan eldonon
de la tradukiloj el la
kataluna
kaj hispana
fare de nia
samasocio
Hèctor Alòs**

**La laborkomputilo
de KIS-TV suferis
virus-atakon ankoraŭ
ne solvitan
kaj tial la skipo
de la ret-televida
informservo ne povis
produkti filmetojn
dum la lastaj monatoj**

Reklamo en la Jarlibro

Kiel en la lastaj jaroj, KEA publikigis malgrandan anoncon en la Jarlibro de UEA por diskonigi sian agadon. La ĉi-jara elektita frapfrazo estis “Aktive laborantaj por lingva daŭripovo”. Per ĝi la asocio celas substreki sian engaĝigon por lingva ekologio, kiu transiras la nuran subskribadon de bonintencaj manifestoj.

Tradukiloj progresas

En januaro 2008 prezentiĝis du aŭtomataj tradukiloj el la kataluna kaj la hispana al esperanto, evoluigitaj de la Universitato Pompeu Fabra de Barcelono surbaze de la malfermita programaro Apertium por aŭtomata tradukado kreita de la Universitato de Alakanto. Unu jaron poste aldoniĝis tria aŭtomata tradukilo, el la angla al esperanto, kreita de la dana komputisto Jacob Nordfalk. Oni anoncas en aprilo novan plibonigitan eldonon de la tradukiloj el la kataluna kaj hispana fare de nia samasocio Hèctor Alòs. Entute, Apertium ŝajnas kuraĝige progresi kiel aŭtomat-tradukada motoro, kaj estis ĵus rekonita de Google per atribuo de studentaj stipendioj por kunlabori en ĝia evoluigo en la ĉi-jara t.n. “Kod-somero de Google”. Samtempe kreiĝis retlisto de esperantistoj, kiuj emas partopreni en la starigo de novaj aŭtomataj tradukiloj bazitaj sur Apertium aŭ plibonigi la jam ekzistantajn.

Komputilaj problemoj malhelpas informadon

La reta novaĵservo alternativa Indymedia Barcelona, konstante publikiganta novaĵojn en kvar lingvoj inter kiuj esperanto, havis komputilajn problemojn en sia retservilo, kaj dum la lastaj semajnoj ne povis aktualigi la novaĵojn. La skipo de Indymedia laboras por solvi la problemon sed verŝajne ĝi ankoraŭ ne estas plene solvita. La skipo de tradukistoj al esperanto daŭre tradukas kaj esperas, ke kiam la problemo estos solvita, la informoj en esperanto aperos ĝisdatigitaj.

Siavice, la laborkomputilo de KIS-TV suferis virus-atakon ankoraŭ ne solvitan kaj tial la skipo de la ret-televida informservo ne povis produkti filmetojn dum la lastaj monatoj. La problemo estas baldaŭ solvota per aĉeto de nova komputilo kaj akiro de

nova programaro, kaj KIS-TVanoj esperas baldaŭ publikigi siajn infokisojn, inter kiuj elstaras raporto pri la lasta Kataluna Kongreso de Esperanto.

fm

Literaturaj premioj en Perpinjano

La Poezia kaj Arta Grupo de Rusiljono, kiu ĉiujare organizas poeziajn premiojn en la franca kaj kataluna lingvoj, decidis aldoni ankaŭ esperanton omaĝe al sia forpasinta membro Renat Llech-Walter. Entute temas pri malofta okazaĵo, ke ne esperantista organizo organizas literaturan premion en la internacia lingvo. La unuan fojon la esperanto-premioj estis aljuĝitaj en la pasinta oktobro fare de ĵurio, en kiu partoprenis la sudkataluno Abel Montagut kaj la tuluzano Arno Lagrange. Entute estis kvar premiitaj verkoj. Ĉi-jare ampleksiĝis la nombro de premioj. La regularon eblas legi ĉe la retejo sites.google.com/site/konkursojenperpignan

**Dekunu-taga
esperanto-maratono**

Pretiĝas esperantoplena aprilo en Barcelono. La aktivaĵoj komenciĝos la 23an de aprilo per la tradiciaj librotagaj budoj en Barcelono kaj Sabadell. Sabaton la 24an kaj dimanĉon la 25an sekvos du duoblaj folklor-muzikaj koncertoj en esperanto en la famega Centre Artesà Tradicionàrius (C.A.T.). Ludos la grupoj Kaj Tiel Plu, Jomo kaj la liberecanoj (Okcitanio), Duobla Unu (Arpitanio) kaj Kapriol' (Frislando). La dumonata revuo *L'Artesà*, eldonita de C.A.T kiel suplemento de la revuo *Sons*, amplekse informas pri la aranĝo en la fronta kaj tria paĝo de sia aprila numero kaj reproduktas fotojn de la kvar partoprenontaj ensembloj. Ankaŭ ĵurnalo *Avui* raportas pri la ciklo en sia kroniko pri folkloro muziko de la 21a de marto.

Ankaŭ dimanĉon la 25an okazos en Sabadell la Festo de la Diverseco, kiun kunaranĝas la lokaj esperantistoj. Ĉi-jare ilia jam tradicia partopreno okazos per budo kaj per lingvo-ateliero.

Rimarkinte, ke la serio da koncertoj en C.A.T. eble fariĝos granda disvastiga aranĝo, oni devas esti preta por respondi bezonojn de scivolemuloj al esperanto. Tial, en la sekvaj tagoj, inter la 27a kaj la 29a de aprilo,

KEJ organizos serion da debatoj kaj rondaj tabloj pri lingvaj rajtoj kaj lingva daŭripovo, malfermitaj al la ĝenerala publiko. Entute KEJ celas, ke tiaj aranĝoj fariĝu regulaj.

La sekvan tagon, 30an, en la mezepoka Kronik-salono de la Urbodomo de Barcelono, kie oni solenos la centjariĝon de la 5a Universala Kongreso de Esperanto. Oni antaŭvidas la partoprenon de po unu reprezentanto de Hispana Esperanto-Federacio kaj Universala Esperanto-Asocio, apud tiuj de KEA kaj la urbo.

Sekvos koncerto de Kaj Tiel Plu en Plaça del Rei la 1an de majo. Temos pri ĝia tria koncerto en ĝi, kio montras la bonan akceptadon de la grupo inter la katalunaj folklor-muzikemuloj. Fermos la maratonon, laŭ iniciato de KEJ, du historiaj ekskursoj tra la urbo, gvidataj de Dani Cortijo, kaj ligitaj al la jaro 1909: sabaton la 2a de majo ĝi turnos ĉirkaŭ la Tragika Semajno, kaj dimanĉon la 3a pri la 5a Universala Kongreso.

fm / ar / rl / red

Printempa renkontiĝo fariĝos aŭtuna

Finfine la printempa renkontiĝo de KEJ okazos en aŭtuno. Lastmonate la organizantoj devis fari tiun decidon pro lavango da lastatempaj malhelpoj. KEJ komencis organizi la renkontiĝon surbaze de logistika kaj diskoniga apogo de la barcelona magistrato kaj katalunia registaro, kiuj promesis kongresejon, amasloĝejon kaj tuturban disvastigon. Tamen, aperis malhelpoj, nedispono de promesitaj ejoj, pagigo de promesitaj senpagaj servoj, kaj la kutimaj burokrataj malfacilaĵoj en magistrato de granda urbo. Fine de marto KEJ estis informita pri neeblo disponi la promesitan kongresejon kaj amasloĝejon kaj nepre devis prokrasti la renkontiĝon al aŭtuno. Intertempe, dum oni klopodas pli bonan interkompreniĝon kun la aŭtoritatoj, oni planas kunveni kun aliaj sociaj movadoj, kaj uzi iliajn ejojn kaj rimedojn anstataŭ tiujn oficialajn. La organizado de aŭtuna renkontiĝo kune kun aliaj kulturaj kaj sociaj movadoj kongruas kun la jam planita programo, kiu rilatas al esperantista ideologio, diskonigo de lingva daŭripovo kaj esperantismo al la kataluna socio kaj diskonigi katalunan kulturon al la eksterlandaj partoprenantoj. Tial, oni espe-

**POPOLMUZIKO KAJ
ESPERANTO EN C.A.T.**

Vendredon la 24an de aprilo je la 22.00a
koncerto: JOMO KAJ LIBERECANOJ (Okcitanio)
dancigo: KAJ TIEL PLU (Katalunio)

Sabaton la 25an de aprilo je la 22.00a
koncerto: DUOBLE UNU (Arpitanio)
dancigo: KAPRIOL' (Frisio)

En Centre Artesà Tradicionàrius
Travessia de St. Antoni, 6-8
Gràcia, 08012 Barcelono
<M> Fontana

Biletoj: 10 eŭroj (anoj de C.A.T. kaj esperanto-parolantoj 5 eŭroj)

ESPERANTO*
CAT
*Asociació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio

C.A.T.

Crifrasma

Diputació
Barcelona
xarxa de municipis

Generalitat de Catalunya
Departament de Cultura
i Mitjà de Comunicació
Centre de Promoció
de la Cultura Popular
i Tradicional Catalana

www.esperanto.cat

ras, ke dum septembro, KEJ organizos sian jaran renkontiĝon.

ar / fm / red

Nova libro pri historio

Bonorde progresas la libro *Història de l'esperanto als Països Catalans. Recull d'articles – Historio de esperanto en la Kataluna Landaro. Artikolkolekto*. Sub la redakto de Francesc Poblet kaj Hèctor Alòs, ĝi kunigos 21 artikolojn de 14 aŭtoroj. Entute temos pri ĉ. 400 paĝoj, ĉar la verko, eldonota de KEA, estos dulingva, kiel la antaŭaj du libroj de nia asocio pri la historio de la kataluna esperanto-movado. Nuntempe oni finas la tradukadon kaj lingvan reviziadon de la tekstoj, kaj oni kalkulas, ke la volumo aperos en septembro.

**Pretiĝas
esperantoplana aprilo
en Barcelono**



Kaj Tiel Plu surbendigas sian trian diskon

de Jules Verne, kiu en la lastaj jaroj de sia vivo fariĝis elstara partiano de la internacia lingvo. Tamen ĉia referenco al esperanto estis forviŝita senspuro de lia filo Michel en *La misio Barsac*. Aliflanke, Jules Verne forlasis la verkadon de sia romano en 1903, t.e. du jarojn antaŭ sia morto.

Abel Montagut, laŭlonge, de siaj artikoloj “Hezito haltigis romanon de Verne pri Esperanto”, “Kruelaĵoj en Kongolando malhelpis al Verne verki pri Esperanto” kaj “Verne patro kaj Verne filo: kien Esperanto malaperis?” esploras la peripetiojn de la verko kaj la kialojn de ĝia interrompo. Montriĝas, ke Verne ĉesigis la redaktadon dum kelka tempo pro tiam famiĝintaj kruelaĵoj en Kongo, kiuj tro akre kontraŭstaris lian originalan romanskizon. Li tre verŝajne planis daŭrigi ĝin, eventuale iom ŝanĝante la intrigon, kiam la politika situacio en la regiono pliklariĝis; tamen tio ne povis okazi, ĉar li malsaniĝis kaj mortis en 1905.

Abel Montagut jam antaŭe proksimiĝis al la figuro de Jules Verne per sia katalunlingva romano *El manuscrit de Jules Verne* (2003).

Abel Montagut pri Jules Verne

Esplorvojaĝo estas aparte interesa por la esperantistoj, ĉar en ĝi esperanto devis centre roli: tion atestas la manuskripto mem, sed ankaŭ la promeso verki tian romanon farita de Jules Verne, kiu en la lastaj jaroj de sia vivo fariĝis elstara partiano de la internacia lingvo

Temo ankaŭ de sia prelego en la kataluna kongreso de esperanto, Abel Montagut entreprenis la publikigon de tri longaj eseaj artikoloj en la revueto *Libera Folio* pri la lasta, nefinita romano de Jules Verne. El la originala manuskripto de *Voyage d'études* [“Esplorvojaĝo”] konserviĝis nur la unuaj 50 paĝoj, kiuj estis unufoje publikigitaj nur en 1993 en kolekto de nefinitaj kaj neeldonitaj tekstoj de la fama franca romanisto. Tamen la filo de Jules Verne reverke kompletigis la tekston kaj publikigis en 1919 la romanon *L'étonnante aventure de la mission Barsac* [“La miriga aventuro de la misio Barsac”] kvazaŭ verkon de sia patro.

Esplorvojaĝo estas aparte interesa por la esperantistoj, ĉar en ĝi esperanto devis centre roli: tion atestas la manuskripto mem, sed ankaŭ la promeso verki tian romanon farita

Novaj diskoj de KTP

Kaj Tiel Plu preparas du novajn diskojn. De la 8a ĝis la 11a de aprilo, la kataluna ensemblo komencos la surbendigon de sia tria disko. La disko, laŭ la kutimo de la bando, komenciĝos per mezepoka kanto kaj finiĝos per alia pri la hispana milito. Entute ĝi kunigos kantojn kaj dancojn el diversmondaj tradicioj, kaj estos denove produktita de Vinilkosmo. La diskon oni finregistros komence de aŭgusto kaj eldonos fine de la jaro. Krome, Kaj Tiel Plu planas publikigi la koncerton okazintan en Tuluzo la 19an de oktobro de 2008, kie ĝi interpretas kantojn en la originalaj lingvoj post ilia prezento en la okcitana.

fm / red



Du elstaraj datrevenoj

La Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna kaj la Fondaĵo Ivo Lapenna instigas ĉiujn esperanto-organizaĵojn celebri la 150-jaran naskiĝ-datrevenon de L. L. Zamenhof kaj 100-jaran de Ivo Lapenna per ekspozicioj, prelegoj kaj artikoloj en la gazetaro pri ilia eminenta kaj elstara laboro. Ni invitas vin senpage utiligi la abundan materialon de nia retpaĝo www.ivolapenna.org

Interreta rubriko

Aperis filmo “Esperanto estas” kiu prezentas nian lingvon laŭ moderna kaj vigla maniero. La filmo, dividita je ses partoj, kreĝis kadre de la organizo E@I – www.ikso.net. Eblas aĉeti ĝin kiel DVD, kun sonversio elektebla inter esperanta, germana, angla, franca, itala kaj portugala, kaj kun subtitoloj en la kataluna, hispana kaj aliaj 27 lingvoj (oni petas kunlaboron por dubli la sonon al aliaj lingvoj). La filmo spekteblas ĉe la adreso: esperantoestas.blogspot.com

Klivo Lendon estas usona esperantisto, kiu de antaŭlonge laboras kiel programisto en Japanio. Li kreis plurajn inĝeniajn ilojn por esperantistoj. Per lia “Gramatikilo” eblas tajpi simplajn frazojn, kiujn la sistemo analizas gramatike. “Ĉapelludo” estas ludilo, kiu proponas multajn tekstojn sen supersignoj kaj montras kolekton da ĉapelaj bildetoj, kiujn oni devas movi per la muso lokante ilin super la koncernajn konsonantojn. “Litertriso” estas ludilo por krei vortojn per literoj, kiuj falas de supre kaj kiujn oni devas loki adekvate per la sagoklavoj. La programoj funkcias per ĝavo en ĉiuj mastrumaj sistemoj.

www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/gramatikilo
www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/chapelludo
www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/litertriso

Ĵus aperis “Reta Terminaro”. Ĝi celas esti iaspeca “supervortaro”, kiu serĉas la deziratan vorton en tri terminaroj: ReVo,

Majstro kaj Komputeko. Kvankam ankoraŭ ne plene ellaborita, indas provi ĝin: www.kono.be/rete

Vikipedio en esperanto superis en marto 2009 la kvanton de 112 000 artikoloj: eo.wikipedia.org/wiki/ĉefpaĝo

La fama desegnofilmo por instruado de esperanto “Mazi en Gondolando” estas elŝutebla laŭ kvalita prezento (formato avi), en du partoj mezurantaj entute 547 MB, el la paĝo java-bog.dk/filmoj_en_esperanto/mazi_en_gondolando

En la sama paĝo elŝuteblas versio MP4, taŭga por poŝtelefonoj kaj similaj iloj.

Malpli kvalita versio (formato flv) en 12 partoj elŝuteblas per Youtube: www.youtube.com/watch?v=mWbyXVSiCcw

En la dokumenta paĝaro de UEA legeblas interesa artikolo de Amri Wandel pri “IKU [Internacia Kongresa Universitato] kaj esperanto en la scienco kaj tekniko”. Oni memoru, ke en ĉi paĝaro elŝuteblas kolektoj da prelegoj okazintaj kadre de la sesioj de IKU dum la lastaj Universalaj Kongresoj de Esperanto: www.uea.org/dokumentoj/IKU/index.html

Darío Rodríguez

Tra la unua jarcento de UEA

Kiam oni vidas unuafoje ĉi tiun libron oni povus pensi, ke temas pri kongresa bulteno, ĉar laŭaspekte la verko vere similas al ĝi, kvankam laŭenhave nur en la komenco tio okazas. Krome se la unua parto pro sia strukturo povas tion kredigi, la du aliaj grade malsimpliĝas kaj, kiel avertas la aŭtoro, se en tiu unua parto, por “akceli la legeblecon” ne aperas la piednotoj, poste ili abundas.

La libro havas tri klare malsamajn partojn. La unua –iom supraĵa, sed interesa historio de UEA– alportas rimarkindajn informojn, kiel la kelkfoje aperanta ideo pri la kompromiso –tiel ni povas legi– en rilato al la eksaj popoldemokratioj de la orienta Eŭropo, ke UEA “devis kompreneble iom cedi al la lokaj cirkonstancoj, sed tion kompensis la granda nombro da kongresanoj ĝuste altirata de tiuj kongresoj”. Tiu rolo de la komunismo multe ripetigis dum la tuta libro kaj en tiu unua parto estas kuriozaj ankaŭ la suspektoj de la KGB pri ia

rilato inter la Universalaj Kongresoj kaj trockista literaturo en esperanto.

La aliaj du partoj, temas pri biografioj: biografio de Hector Hodler, fondinto de UEA, kaj de Ivo Lapenna, dum multaj jaroj ĝenerala sekretario kaj poste prezidanto de UEA. Pri ili informas nek la titolo, nek noto sur la kovrilo. La biografio de Hodler, iom pli mallonga ol tiu de Lapenna, rememorigas la unuajn jarojn de UEA, kaj la kerno de la rakonto, krom li vivo, montras la aktivan internaciecon de UEA, kiun teksis Hodler. Menciindas la jam forgesita ideo, ke UEA konsistis nur el individuoj, do neniu estis trudita aparteni al naciaj asocioj.

La lasta parto, pli kompleksa, pri Ivo Lapenna kaj la komunistoj montras la kontraŭdirojn de tiu fascina persono, la konstruanto de la moderna UEA. Li debutis kiel kontraŭstaranto de la estraro de UEA, *l'enfant terrible* de la 32a Kongreso en Berno (1947), kvalifikita

kiel “la granda kontraŭulo de la etburĝa oportunisma neŭtraleco”. Jam antaŭe li parolis pri la “pasiva neŭtrala sinteno al faŝismo kaj reakcio de UEA”, sed post la 59a UK en Hamburgo (1974) li grave trotaksis “la ambicion de komunistaj funkciuloj enpenetri la vicajn de la esperantistoj kaj subfosi la esperantomovadon” alvokante la neŭtralecon de UEA.

Per siaj tri belaj historiaj rakontoj, Ulrich Lins regalas al ni etan trezoron, leĝindan kaj legeblan por diskonigi parton de la movada historio, kiun reprezentas UEA. Krome la plaĉa eldono, kun tre alloga kovrilo kaj belaj fotoj, certe favoros ĝian disvendadon.

Ramon Llop

Ulrich Lins: *Utila estas aliĝo*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2008. 126 p.

Ve de la portada

Les dades de l'Eurobaròmetre, tant per damunt de totes les altres, resulten especialment preocupants quan provenen d'un estudi que vol contribuir a les decisions en matèria de política lingüística a la Unió Europea en un marc de discussions que promou legislar a favor de la supremacia de l'anglès

Per veure-ho, analitzem les dues grans enquestes amb dades sobre el coneixement de llengües estrangeres a Catalunya: l'Estadística d'Usos Lingüístics a Catalunya de 2003 (EULC03), i el Baròmetre de la Comunicació i la Cultura que publica enquestes trimestralment des de 2007. L'EULC03 és un estudi realitzat per l'Institut d'Estadística de Catalunya sobre una mostra de més de set mil persones, de quinze anys o més, residents a la comunitat autònoma de Catalunya. El Baròmetre és un estudi sobre hàbits de consum cultural que realitza periòdicament la Fundació Audiències de la Comunicació i la Cultura a Catalunya, el País Valencià i les Illes Balears sobre uns quaranta mil individus de catorze o més anys, residents en el territori. No és un estudi sobre coneixements lingüístics, però les preguntes que formula revelen, entre altres moltes coses, el coneixement de llengües estrangeres de la població enquesta. Dels sis Baròmetres publicats fins ara, triarem el primer (novembre 2007) i el més recent (març 2009).

A més d'aquests dos estudis, podem també incloure, amb molt de compte, l'Eurobaròmetre especial de 2006 sobre "els europeus i les seves llengües": un ampli estudi de la Unió Europea sobre els coneixements, les actituds i els usos dels seus ciutadans sobre les llengües. A aquest efecte es van enquestar en 29 estats diferents (l'actual Unió Europea més Croàcia i Turquia) unes trenta mil persones de quinze o més anys, ciutadans d'aquests estats (encara que residissin en un altre). L'Eurobaròmetre, però, només ha publicat dades a nivell dels estats, per la qual cosa no es disposa de dades específiques sobre Catalunya. A més, té el biaix de no tenir en compte vora un 7% de la població catalana, en el moment de l'enquesta, que no

